

# FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE  
77610 FONTENAY TRESIGNY  
FRANCE

# KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★  
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 PARIS  
Sekr: S-ro R. DESPINEY 43, quai de Champagne 94170 LE PERREUX/Marne  
Kasistino: S-ino J. VINCENT L' Oazo B. P. 54 49150 BAUGE  
Peranto IKUÉ: P-ro R. DEGRELLE B. P. 23 54510 TOMBLAINE

C.C.P. Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN

==== la n°: 6 F. Abono: 23 F (TTC). Kotizo: 7 F. Sume: 30 F. ====

+++++

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent nepre antaŭ la  
5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

+++++

==== N° 140 ===== BULLETIN TRIMESTRIEL ===== TRIMONATA BULTENO =====  
\*\*\* Sankta PIO X-a, preĝu por ni. \*\*\*

==== MARTO 1984 =====

+++++

## BILETO DE LA PREZIDANTO

En créant la Langue Universelle, le Docteur Zamenhof avait eu l' intuition géniale qu' elle devait devenir, outre un moyen de communication au service de tout ce qui concerne les besoins et les cultures des hommes, le support de relations de fraternité et d' entente entre les peuples.

Sans que chaque peuple perde sa personnalité, ses traditions, son langage, l' usage d' unè langue neutre pouvait permettre, dans l' égalité, la création d' un terrain d' échange, de compréhension mutuelle, de communication.

Certes, dans ce monde éprouvé par les conflits, les rivalités et les guerres, les progrès de cet idéal de paix, comme tous les mouvements d' opinion en faveur de la justice et du respect de tous les hommes, rencontrent beaucoup d' obstacles et tout au moins beaucoup d' indifférence. Pourtant depuis la première diffusion des oeuvres du créateur, malgré les batailles et les destructions, l' Esperanto a continué à vivre et à atteindre toutes les parties du monde, et à manifester sa vitalité dans ses congrès universels.

Lorsque, au début de ce siècle, l' Esperanto commença à se répandre, des catholiques ont entrevu ce que pourraient apporter au peuple chrétien ce moyen pratique et l' idéal dont il était porteur. Parmi certains pionniers de l' Esperanto, chrétiens fervents, Emile Peltier, prêtre du diocèse de Tours, avec l' autorisation de son évêque, s' est consacré avec tous les risques d' une telle entreprise, à la création d' Espero Katolika, cette revue toujours vivante née en 1903. Par la suite, un autre prêtre, Austin Richardson, fonda l' Union Internationale Catholique Espérantiste.

La revue devait devenir, dans l' intention de son fondateur, un lien entre les catholiques de tous pays, au service de ceux qui formaient ensemble le peuple de Dieu. Bien en avance sur les démarches actuelles de l' oecuménisme, Emile Peltier voulait aussi que son oeuvre serve à la reconnaissance mutuelle et au rapprochement des chrétiens, frères dans le baptême et la foi en Jésus-Christ, au-delà des ruptures qui avaient douloureusement opposé ceux qui se réclamaient

.. / ...

pourtant du même Evangile.

Espero Katolika et IKUE ont survécu à toutes les conditions défavorables qui se sont rencontrées tout au long de leur histoire. L' Esperanto a même acquis une modeste place parmi les émissions en multiples langues de Radio-Vatican. Grâce aux progrès actuels de l' oecuménisme, des rencontres d' échanges et de prière, sur les plans interconfessionnel et international, sont devenues régulières, et pratiques grâce à l' usage de la Langue Internationale.

Ajoutons que ce qui existe entre des chrétiens se fait de même dans les domaines les plus variés, et que l' action des uns s' ajoutant à celle des autres, on voit se réaliser ce qui pouvait ne paraître qu' une utopie imaginée par le Dr Zamenhof.

Beaucoup voudraient que l' Eglise officielle fasse un grand pas vers l' Esperanto, que sa hiérarchie en encourage l' emploi dans ses institutions, qu' elle en préconise l' enseignement dans ses séminaires.

Mais il ne suffit pas de former des vœux pieux. Tant que, parmi la masse des croyants, un nombre considérable de personnes et de groupes n' utilisera pas la langue pour ses relations parlées, écrites, imprimées, diffusées, peu de nos évêques, de nos prêtres saisiront les potentialités qu' elle porte en germe.

Pour mettre l' Esperanto au service du peuple de Dieu dont, à travers le monde, nous ne formons qu' un microcosme, notre vocation est d' apporter l' exemple, au-dessus de nos diversités, d' un rapprochement, d' une cohésion, d' une recherche incessante de l' Unité; que le Seigneur nous assiste!

R. Cl. COLAS

#### Resumo por niaj alilandaj amikoj

Kiam Doktoro Zamenhof kreis la lingvon Esperanto, li, per genia intuicio, ekvidis, ke komuna lingvo alportos al la homaro de diversaj kulturoj kaj landoj, rilatojn de frateco kaj harmonio inter la popoloj.

Ekde la komenco de la disvastigo de la nova lingvo, adeptiĝis kelkaj fervoraj kristanoj; tiuj konsciis la utilecon de tia rimedo por doni al la kredantoj ilon por pli da komuneco trans la landlimoj kaj la kulturaj baroj.

Konkretigante tiun ideon, Emile Peltier, pastro de la eparĥio de Tours, dediĉis sian vivon, kun la aprobo de sia episkopo, al la kreado de Espero Katolika en 1903. Poste, alia pastro, Austin Richardson, fondis la Internacian Katolikam Unuiĝon Esperantistan (IKUE).

Laŭ la intenco de la fondinto, la revuo devis iĝi ligilo inter ĉiujlandaj katolikoj, grava informilo je la servo de la Eklezio. Plie, li rezervis lokon al la reciprokaj interŝanĝoj inter la kristanoj, fratoj per la bapto kaj la kredo en Kristo, spite de la rompoj, kiuj suferigas la disĉiplojn de l' Evangelio.

Espero Katolika ĉiam vivas, malgraŭ la malglataĵoj de tiu maltrankvila jarcento. Esperanto estas akceptata inter la multaj lingvoj uzataj de Radio Vaticano.

Sed ni ne faru al ni iluziojn: malgraŭ la revo de kelkaj, ke la oficiala Eklezio adoptu Esperanton, ke la hierarĥio aŭdacu enkonduki Esperanton en siajn instituciojn, en siajn edukejojn, tia okazaĵo eblos nur, kiam granda nombro da homoj, da grupoj uzos praktike Esperanton en la internaciaj rilatoj, per parolo, presado, skribado, atestante per la praktiko la potencialecon en ĝi entenatan.

Helpu la Sinjoro, ke ni sukcesu, per nia senlaca agado, fari ion por la regno de Dio kaj la unueco de la dia popolo.

R. Cl. C.

#### NIA KONGRESO 1984

Par les questions posées dans le précédent numéro, nous demandions à tous les membres de l' association de participer en répondant à la marche et au développement de l' association, spécialement à l' occasion du congrès de Blois.

Il est nécessaire que des relations s' établissent entre tous nos membres isolés ou groupés localement, et ceux qui ont accepté la responsabilité de mettre en oeuvre les orientations qui doivent être le fait de tous.

Cet appel n' est pas une inquisition, mais son objectif est de permettre d' évaluer en vue d' une synthèse les possibilités offertes par nos adhérents à la progression de notre mouvement. Il peut, si chacun y répond, déboucher sur un nouvel élan, sur une cohésion et une activité en progrès.

../...

Ceci, bien entendu, n' occulte pas le thème de réflexion proposé: la Justice, l' une des ~~xxxx~~ grandes vertus morales dont toutes les applications personnelles, sociales, politiques, constituent les aspects essentiels du commandement "Tu aimeras ton prochain comme toi-même." Nous souhaitons aussi que nos amis, en nous écrivant, nous fassent part de leurs idées ou réflexions personnelles.

R. Cl. C.

+++++

#### POR LA MALĜOJA MOMENTO

Jen mi petegas vin, ho tre kompatema,  
Kune kun Ĉiuj sanktuloj mi plorpetas Vin.  
Elaŭdu min tra ili jam nun  
Por ke Vi ne forgesu min ĉe l' vivofino.

Vi gvidis min laŭ la psalmo  
Kaj Vi savis min  
Elsavu min, Sinjoro, kun la psalmisto,  
De la duboj kaj embarasoj, kiuj timigas min.

Mi mem ne indas ricevi de Vi  
La salajron de la ĉiutaga nutraĵo.  
Sed Vi kapablas, laŭ via kutimo,  
Bonfari eĉ al mi, kvankam mi estas sendanka.

Vi plenumas mirindaĵojn  
Kaj neesprimeblajn bonaĵojn.  
Vi sola faras miraklojn  
Por longdaŭra tempo.

Kun la Patro kaj la Sankta Spirito vi estas benata  
En la miljaroj de miljaroj. Amen.

S-ta Gregorio el Narek  
Armeniano de la 10-a jarcento.

+++++

#### TRA LA MONDO

La hundo bomboflaranto nomiĝas Klodo kaj oficas ĉe la italaj ĝendarmoj. Klodo flaras iajn ajn eksplodaĵojn. Dank' al sia miriga flarkapablo, ĝi povas antaŭeviti bombatencojn.

La "nigra papo" de la Jesuitoj estas nederlandano kaj nomiĝas Peter Hans Kolvenbach. Li estas 55-jara kaj estis elektita kiel nova generalo de la jesuitoj post baloto de nur 45 minutoj. Pastro Kolvenbach eniris la Kompanion de Jesuo en 1948 en Mariendaal (Nederlando). Li sacerdotiĝis en 1961 en Bejruto, kie li vivadis de 1968 ĝis 1981 kaj instruis la ĝeneralan lingvistikon. En 1981 li iĝis rektoro de la pontifika instituto en Romo.

Oni vendas la Eiffel-turon aŭ pli ĝuste erojn el ĝi. La malnova turo estas daŭre renovigata kaj pro tio multaj partoj estas ŝanĝitaj. Sed la eltiritaj eroj ne estas forĵetitaj. Ili iĝas "antikvaĵoj", kiujn aĉetas kolektantoj. Dum decembro 1983, oni vendis la helikoidan ŝtupareton, kiun Gustave Eiffel grimpis en la tago de la inaŭguro en 1889 por surmeti la francan flagon ĉe la turpinto.

+++++

#### BIBLIA SEMAJNFINO

25/27-an de majo 1984 en abatejo Grüssau, Bad Wimpfen, proksime al Heilbronn apud Stuttgart/Germanujo. Prelegos sac. Angelo Duranti, direktoro de "Biblia Revuo" pri la temo: "Tradukoj de la Biblio en Esperanto - de Zamenhof ĝis la nova ekumena traduko". Reduktitaj prezoj pagendaj per franca mono en Bad Wimpfen. Manĝoj kaj du tranoktoj: 60 FF en plurlita ĉambro simpla; 150 FF en unu- aŭ du-lita ĉambro laŭdezire. Aliĝo ĉe Pastro Bernhard Eichkorn, Kolpingstr. 8, D-7790 MESSKIRCH.

NDLR. Mi tre rekomendas tiun semajnfinojn al la abonantoj de "Biblia Revuo".

LINGVA ANGULO

Al la unuaj proponoj por la jaro 1984 venis nur 4 respondoj. Se ne venos pliaj kunlaborantoj, oni aljuĝos nur unu premion, en valoro de 60 F. Bonvolu noti ĉirilate, ke la premio ne konsistas el mono, sed el objekto (libro aŭ kreditkarto) valoranta 60 F. Bonvolu elekti inter tiuj du eblecoj.

Jen la tradukoj proponitaj de G-roj BOURGOIS (B), DAUCHEZ (Da), DEGOUL (De) kaj MICHAU (M).

1) il ne faut pas lui jeter la pierre: ne decas superŝuti lin per indignaĵoj, ne decas superkulpigi lin (B); oni ne devas lin akuzi (Da); li ne ŝtonumindas (De); ne kondamnu lin (M).

2) le boxeur malchanceux a jeté l' éponge: la malbonŝanca boksisto rezignis batali/batalrezignis (B); la malŝanca boksisto ne devas rifuzi la spongon (Da); la malbonŝanca boksisto rekonas sin venkita (M).

3) jeter sa gourme: junulpetoli, forĵeti sian ĉastecon (B); forlasi la decon de la infaneco (Da); travivi junecan malsaĝecon (M).

4) jeter son dévolu: pretendi pri io, elekti kiel amat(in)on (B); elekti, decidi ies akiradon (Da); pretendi (De); elekti iun aŭ ion (M).

5) il a jeté son feu: lia fervoro estingiĝis, elĉerpiĝis (B); li faris sensacion, sed nenio sekvis (Da); lia ardo malvigliĝas (M).

6) je vais m' en jeter un derrière la cravate: mi tuj ĵetos al mi gluton trans la gluton (B); mi fluigos ion tra mia ezofago (Da); mi tuj elglutos trinkaĵon (De); plezure mi tuj trinkos plenglason (M).

7) jeter un regard en coulisse: glitigi oblikvan rigardon, subrigardi (B); sekrete ekrigardi, kaŝe spioni (Da); oblikve rigardi (De); kaŝe rigardi oblikven (M).

8) faire le joli coeur: aktori plaĉulon, amindumi (B); per ŝajna koro allogi (Da); kokete eleganti (De); dande konduti (M).

9) jouer cartes sur table: surtablighi/sterni siajn kartojn, malkaŝi sian ludon (B); kaŝi la veron (Da); senkaŝe aĝi (De); nenion kaŝi, ne trompkaŝi (M).

10) jouer de malheur: trafadi nur mise, daŭre malbonŝanci, nur malbonŝanci (B); esti malŝanca, elekti malbonan okazon (Da); malbone fortunaj (?) (De); sperti sin-sekvajn malsukcesojn, suferi sinsekvajn malfeliĉojn (M).

Jen la unua klasifiko por 1984: 1) S-ino MICHAU (7 p.); 2) S-ro DAUCHEZ (5); 3) S-ro BOURGOIS (4); 4) S-ro DEGOUL (2).

Graŭlojn al tiuj kuraĝuloj!

Jen novaj proponoj de S-ro Bourgois: 1) jouer des jambes; 2) il faut jouer le jeu; 3) jouer les héros; 4) jouer quitte ou double; 5) jouer serré; 6) jouer ses derniers atouts; 7) jour pour jour; 8) trouver un juste milieu; 9) il l' a emporté de justesse sur son concurrent; 10) chercher querelle.

\*\*\*\*\*

VIZITU KONGRESOJN

76-a franca landa kongreso en BOURGES 8/12-an de junio 1984 (Pentekosto).  
Programo: diskutoj pri la movado, kantoj kaj teatraĵoj en Esp<sup>o</sup>, libroservo.  
Ekskursoj tra Bourges kaj en la regiono.

Aliĝoj: 76-a franca landa kongreso 21, rue Moyenne 18000 BOURGES.

18-a markola kongreso en Boulogne-sur-Mer 4/7-an de majo 1984 en "Centre communal d' action sociale", Bd Daunou.

Aliĝkotizo: 30 F - edz(in)o: 20 F pagotaj al p.ĉ.k. LILLE 4356 09 H "Congrès espérantistes du détroit".

Informas: S-ino M. J. LINE 34, rue de Beaurepaire 62200 BOULOGNE-sur-Mer.

Tel. (21) 80 62 57

\*\*\*\*\*

Novaj membroj 1984: 1) F-tino CHOUIN (I & L); 2) D-ro KEMPNY (Ĉeĥoslovakaĵo)

Membroj bonfarantoj: 1) F-ino ESPRIT (Hte-M); 2) S-ro BIRON (Italujo); 3) F-ino STUTZMANN (Ht-Rhin)

Specialan dankon al ĉi lastaj, kiuj grave helpas la kason!

LA FKEA-KONGRESO EN BLOIS

La ĝenerala temo estas: "JUSTECO EN NIA Nuntempa Mondo".

Ni serioze preparu nian katolikan kongreson, ĉar preparado estas kondiĉo de utileco kaj valoro. Jen kelkaj demandoj, kiujn ni povos utile pripensi:

1. Ĝenerala difino de esencaj vortoj: Justeco, Solidareco, Karitato, Liberiĝo, Paco...
2. Ĉu Justeco ekzistas
  - a) inter la popoloj
  - b) inter la grupoj de popoloj
  - c) " la kuncivitanoj
  - d) " la civitanoj kaj ilia registaro?
3. Kiajn efikajn agadojn ni, katolikaj esperantistoj, povas konduki por kreskigi la Justecon:
  - a) en nia proksima medio, en la Esp<sup>o</sup> medio, en nia propra vivo?
  - b) per kiuj rimedoj: preĝoj, konversacioj, prelegoj, korespondado?
  - c) restante informitaj pri la aktualeco per la legado de Esp<sup>o</sup> kaj ne Esp<sup>o</sup> periodaĵoj kaj libroj: kiuj?

N.B. Bonvolu kiel eble plej baldaŭ sendi al P. L. Bourdon 7, av. Salomon 59800 LILLE aŭ almenaŭ alporti al la kongreso SKRIBAN RESUMON de viaj respondoj al tiuj gravaj demandoj. Tio faciligos valorajn interŝanĝojn dum la kongreso kaj efikajn agadojn post la kongreso. Antaŭdankojn!

+++++

PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNSIDO DE LA 20-a de NOVEMBRO EN PARIS

Ĉeestas: P. Bourdon, F-to Marmou, S-inoj Michau kaj Vincent, F-ino Preux, S-roj Bessière, Colas, Despiney, Lafargue kaj Villeneuve.  
S-ro Pons ĉeestas pro la preparado de la kongreso en Blois.

Petis senkulpigon: S-ro Lecocq.

La kunsido komenciĝas je la 14.00 per preĝo, por ke la kristanaj esperantistoj estu pli kaj pli multaj kaj por la ekumena problemo. Tagordo kaj raporto de la lasta kunveno estas aprobitaj.

FKEA-kongreso: 5/7-an de majo en Blois. V. prog. amon en la decembra n<sup>o</sup>. Amase aliĝu, vi ne bedaŭros.

Tombo de P. Peltier: dankon al la 29 donacintoj. Bonvolu rapide sendi vian kontribuaĵon, ĉar ni devos baldaŭ pagi la fakturon.

IKUE: la ekumena kongreso ne okazos. V. EK n<sup>o</sup> 9 p. 136.

Bulteno: 180 oni sendas al Francoj, 49 eksterlanden. Mankas artikoloj.

Finanĉoj: bonfartas, tamen la bulteno pli, kaj pli multekostas, kaj ni devas plialtigi la kotizon al 30 F.

Diversaĵoj: la informilo "Jeune chrétien" estas elĉerpita. Bonvolu cerbumi por verki novan allogan informilon.

"Vermeil": tiu revuo aperigis artikolon pri Esp<sup>o</sup>, kiu venigis kelkajn informojn kaj unu aliĝon al perkoresponda kurso. Dankon al nia vigla ano S-ro Perdraud, kiu modele informas la katolikan gazetaron.

"Joie, santé, culture": tuta paĝo dediĉita al Esp<sup>o</sup>.

Venonta komitatkunsido: 19-an de februaro.

La kunveno finiĝas je la 17.00 per la kanto: "Marŝas ni al l' unuec'."

Protokolis: G. PREUX

+++++

BIBLIA KAJ EKUMENA LABORGRUPO EN LILLE

En la ekumena kongreso en Dalfsen (Ned.) en 1981, oni sugestis la kreadon de laborgrupetoj. Tion ni faris en Lille: kunsidoj kunigas dekon da aktivaj partoprenantoj, sub la gvidado de P. Bourdon.

La unua kunveno okazis la 19-an de novembro 1983. Oni studis pri la ortodoksa eklezio. Ĝi estas unu el la tri nunaj kristanaj eklezioj, kun la katolika kaj la protestanta. Tiu eklezio enhavas inter 170 kaj 200 milionoj da fideluloj. Dum 10 jarcentoj, estis nur unu eklezio, la kristana. La doktrino estis precizigita en orientaj koncilioj. La unua okazis en Jerusalemo en la unua jarcento. Jen la 4 sekvantaj: Niceo (325), kie la episkopoj difinis la egalecon la egalecon inter Kristo kaj lia patro.

Konstantinoplo (381): en Dio estas unu naturo kaj tri personoj, Patro, Filo kaj

.. / ...

Sankta Spirito.

Efeso (431): kontraŭ Nestorius, oni difinis, ke Jesuo-Kristo estas nur unu persono.

Kalcidonio (451): oni asertis, kontraŭ la monofizitoj, ke, en Kristo, kunekzistas du naturoj, la dia kaj la homa.

Okazis aliaj koncilioj en la sekvantaj jarcentoj.

La malakordo inter la orienta parto de la eklezio kaj la okcidenta okazis en 1054.

Per tiaj kunvenoj, ni opinias, ke ni efike sekvas la impulson de nia profeta pastro E. Peltier, kiu kreis "Espero Katolika"-n en ekumena celo.

G. Preux.

\*\*\*\*\*

FINANCA RAPORTO POR LA JARO 1983

| ENSPEZOJ         |                 | ! | ELSPEZOJ            |                 |
|------------------|-----------------|---|---------------------|-----------------|
| Kotizoj          | 3 435,00        | ! | Bulteno             | 1 648,58        |
| Donacoj          | 1 518,00        | ! | Korespondado        | 810,70          |
| Rentumo ŝparkaso | 207,74          | ! | Vojaĝoj komitatanoj | 1 856,50        |
| Deponoj "        | 860,00          | ! | Elspezoj Lourdes    | 508,47          |
|                  |                 | ! | Diversaj            | 146,70          |
|                  | <u>6 020,74</u> | ! |                     | <u>4 970,95</u> |

Pozitiva saldo 1 049,79

En la kaso la 1/1/83 4 245,06

En la kaso la 31/12/83 5 294,85

\*\*\*\*\*

LA PIGIDOJ

Mi deziras rakonti al vi fabelon pri birdoj. Estis pigino, kiu kondukis siajn idojn tra la kampoj por instrui kiel oni vivas; sed ili ŝajnigis sin naiveguloj kaj ĉiam deziras reiri al la nesto, opiniante, ke la patrino devas ĉiam nutri ilin per beko. Tamen, ĉar ŝi vidis ilin tute fortikaj por iri tra la kamparo, ŝi iom post iom eklasis ilin tute solaj, instruante ilin tiel:

- Infanoj miaj, disiru sur la kamparo; vi estas sufiĉe plenaĝaj por perlabori; mia patrino lasis min, kiam mi estis multe malpli aĝa ol vi.

- He, ili diris, kion ni faros? La arbalestistoj mortigos nin.

- Tute ne, diris la patrino, por celadi bezonas tempo: kiam vi vidos, ke ili levas la arbaleston kaj metas ĝin kontraŭ vango por pafi, disforkuru!

- Nu! ni tion faros, sed se iu prenas ŝtoneton por frapi nin, ne bezonas, ke li celadu. Kion do ni faru?

- Vi tiam vidos, diris la patrino, kiam ili sin klinas por levpreni la ŝtoneton.

- He jes, diris la pigidoj, sed se li okaze ĉiam kunportas la ŝtoneton pretan en mano por ĝin ekĵeti?

- Ha! diris la patrino, kiel vi multe scias! Iru, vi elturniĝos, se vi tion volas.

- Kaj tion dirinte, ŝi forlasas ilin kaj foriras.

Bonaventure des Périers (1495-1544)

Tradukis A. B.

\*\*\*\*\*

PREĜEJO - DANKMONUMENTO

al la Dia Providenco pro la elekto de Johano Paŭlo II, la pola Papo

Nia novkreiĝanta paroŝo deziras inde memorigi tian grandan historian eventon. En la ĉefaltaro estos lokigita (en triptiko) bildo pri S-ta Pio X, la laste kanonizita Patro Sankta, la Patrono de la Katolika Esperanta Movado.

Arde rekomendante ĉi tiun preĝejkonstruadon al viaj preĝoj transsendas prapolan, koran "Dio rekompencu!" pro ĉia, eĉ eta helpesprimilo

dankema animpaŝtisto

kaj fideluloj el Zagornik.

Animzorgado de esperantistoj ul. Janka Krasickiego 6 PL-33-100 TARNOW Pollando

SIGELILOJ KAJ SIGELOJ

La sigela origino venas el la plej malproksimaj antikvaj tempoj. La re-produkto per vakso aŭ metalo de objekto speciala je la utiliganti, estas nomata sigelo. Tiu ĉi objekto konsistas el sigelilo havanta preskaŭ ĉiam skribaĵon klar-iganta ĝian celon.

La personaj sigeliloj estas plej ofte rompitaĵoj je morto de la posedan-to; la urbaj, abatejaj kaj preĝejaj sigeliloj servis pli longtempe. La sigeloj estas pli ordinaraĵoj, ... sed kiel rompiĝemaj! La vaks el kiu ili konsistas facile rompiĝas; la tempo ĝin putrigas kaj forpolvigas.

Estas metalaj kaj vaksaj sigeloj: por la unuaj, nome bulo, oni uzis oron arĝenton kaj plumbon. La oraj sigeloj, uzitaj de imperiestroj, Papoj kaj Doĝoj, nun estas malmultaj. Oni trovas plumbulojn en sudlandoj, kie la sigela ekzisto povis esti malfirmigita pro varmo. Ĉiuj Papoj, ekde 614, uzis metalon.

La rozkolora vakso ekaperis ĉe la XII-a jarcenta komenco, kun Ludoviko la Dikulo (1113). La verdaj vaksoj, ĉirkaŭ 1163, kun Maurice de Sully, pariza epi-skopo.

La kancelario de Francujo sigelis senfinemajn dokumentojn per verda vak-so sur rozkoloraj ligiloj, la provizorajn dokumentojn per blanka vakso sur perga-mena trenaĵo.

La sigeloj estis surmetitaj sur la dokumentoj ĉu ĵetfiksataj ĉu pendiga-taj. La ĵetfiksataj sigeloj konsistas el vakso. Ili estas fiksataj jene: oni en-tranĉis la pergamenon krucforme; oni refaldis la entranĉajn angulojn, por ke la varma vakso ekpremita de la sigelo povu trapasi ĉe la dorson de la dokumento. Tiu sigelo-maniero estis observata ĝis Ludoviko la Dikulo.

La unua reĝa pendigata sigelo okazis en 1118. Tiu sigeloj ordinare estis retenigataj je la dokumento per ligilo pasita tra horizontala entranĉo. Ili do es-tis fiksataj sur silkligiloj aŭ pergamenaj rubandoj.

Kelkaj sigeloj ekaperas al ni kiel ĉefverkoj de skulptaĵoj; ni admiru ni-ajn prapatrojn en tiuj altnivelaj artaĵoj!

El la revuo Art et Tourisme dans le Maine)

xx

CONQUES-a ABATEJO

Starante ĉe la apudlimaĵo de Aveyron, Cantal kaj Lot, la Conques-a abat-ejo superstaras la riveron Dourdou en loko, kiun oni nomis unue Vallis Lapidosa (Ŝtona valo) pro ĝia sovaĝa interkrutejo tre ŝatata de la turistoj.

En tiu valo, en la 3-a jarcento, ~~na~~ fondis laŭ la tradicio la nunan ab-atejon monaĥo nomita Dadon. La monaĥejo estis rapide tiel konata kiel Rocamadour, kiu estas proksima. La Karolaj reĝoj ofte vizitis ĝin; Karolo la Granda donacis al ĝi relikvujojn formantan la literon A. Imitis lin Pépin el Akvitanujo, kiu do-nacis multekostam relikvujojn.

Ludoviko la Troopardonema estis unu el la bonfarantoj al la abatejo kaj li donis al ĝi la nunan nomon Conques laŭ la loka topografio (ad instar conquae).

En 730, la landon invadis la Araboj. Mil kristanoj estis martirigitaj kaj deĵetitaj de ŝtono, sude de la urbeto, kie staras nun kruco kun memoriga plato.

Conques rapide releviĝis el siaj ruinoj kaj dum la 12-a jarcento furoris. La "Guide de St-Jacques de Compostelle" verkita en 1139 indikas, ke unu el la kvar vojoj de Francujo ĝis S-ta Jakobo en Kompostelo iris tra Le Puy, Aubrac (kie sta-ris Domejo - Domerie - fondita de Adalard), Conques kaj Moissac.

Hodiaŭ Conques estas malbone konata vidindaĵo, malproksima je la gravaj vojoj.

Sendita de A. B.

xx

MIA PATRINO

Iris tra vivo patrino mia kaj kiel pentantino tristis;  
tago ŝia ne havis brilon, floron, koloron, odoron;  
produkton de vivo seka nur, kiu cindre gustis,  
sen refreŝigo deŝiris el la arbo de tempo.

Polvo akra de malriĉeco ŝian belecon de beleco vergobatis  
kaj dolore segis en okuloj kaj per larmoj estingis oftalmiton,  
kiel simuno en neĝoblovaĵo en iliajn vojojn kuŝpremiĝis  
kaj en siaj ondoj al ŝi, laciĝinta, volbiĝis azilo.

Sub pezo de mallumaj jaroj ŝia kliniĝis nuko,  
ardo de laboro al ŝi el nervoj freŝecon kaŭterizis,  
la morton sian ŝi kisis kaj en peza agonio  
lipo ŝia kun ekrido nur vortojn de dankoj flustris.

Sur malsekan marmoron de temploj genufleksadis en sonĝo,  
en tombaj odoroj de vakskandeloj kaj antaŭ altaro  
kaj bonodoraj konsoloj de pluvo, ankaŭ vizion de la savo  
en kalikon de sia animo kaptadis kiel ĝi estus rosa brilo.

Ho, patrino mia, hodiaŭ jam ŝanĝiĝinta en lumon,  
Vi, sago ora, elpafita en fokuson  
de la Misteroj eterne flamantaj! Sono de Via nomo  
sur niaj ondoj fintremis, sed mi scias, Vi estas proksima!

De Via morta malvarma sango mi estas pala floro,  
kiu per malsekaĵo de okuloj Viaj ekĝermis kaj kreskis;  
maldolĉan apetiton de la vivo per Via enkisis al mi lipo  
kaj per Via heredaĵo al mi en animo malĝojo nur restis.

Noktomezo verda kiam tra nokta silento brilas,  
Vi el tombo elstaras kaj kun mi liton sciigemas;  
en mia spiro konatan ritmon de Via spiro mi aŭdas  
kaj per ondo de mia voĉo reviviĝinta Vi ĝemas.

En miaj vejnoj varmiĝas varmo de Via korpo,  
malluma brilo de Viaj mallumaj okuloj en miajn okulojn verŝiĝis,  
ekbruligo de kredo mistika, per kiu Via tremiĝis animo,  
en mia animo en fajron ardegan kaj sangan enkorpiĝis.

Kaj kiel Via iam, ankaŭ mia voja trista estas;  
sen odoro tago mia estas, sen floroj, brilo, koloro,  
frukton de vivo seka nur, kiu kiel cindro gustas  
per Via ombro ĉirkaŭblovanta, mi ŝiras el arbo de tempo.

Otakar Březina.

xx

KOTIZTABELO 1984

IKUE kun "Espero Katolika" 75 F  
Peranto: P. Degrelle c.c.p. NANCY 2 555 38 L.

-----  
ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" 30 F  
Infanoj ĝis 16-jaraj, pastroj, religiul(in)oj 15 F  
Bonfarantoj 150 F  
Dumvivaj membroj 600 F

-----  
UFE kun "Revue Française" 155 F  
UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro 190 F

-----  
Abono al "Biblia Revuo" 50 F

Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2324 93 N.

xx

ENHAVO

- 1.2. Bileto de la prezidanto Biblia laborgrupo en Lille
- 3. Por la malĝoja momento 6. Financa raporto
- Tra la mondo La pigidoj
- Biblia semajnfino Preĝejo - Dankmonumento
- 4. Lingva angulo 7. Sigeliloj kaj sigeloj
- Vizitu kongresojn. Conques-a abatejo
- 5. La FKEA-kongreso en Blois 8. Mia patrino
- Protokolo de la komitatkunsido Kotiztabelo

xx

Dépôt légal: 1er trimestre 1984 !! Polycopié par l' A. C. F. E.  
C.P.P.A.P. n° 62 532. Directeur: R.Cl, !! Prĥeurĕ St-Martin La Houssaye-en-Brie  
Colas;dir-dĕlĕguĕ: R.J. Marmou !! 77610 FONTENAY TRESIGNY FRANCE